LA NASKA FASKO 2023



William Peace University 2-8 julio 2023

DE LA NASK-TEAMO

Mi apenaŭ povas kredi, ke NASK nun atingas sian finon. Dankon al ĉiuj el vi pro via partoprenado en la kursaro. Por la 54-a fojo, la Nord-Amerika esperantistaro montras, ke al ĝi gravas ne nur paco kaj internacia amikeco per Esperanto, sed ankaŭ serioza lingva plibonigo kaj eventuale eĉ perfektigo.

Eble vi ne rimarkas tion ĉi pro la freneza semajno, sed mi ĉe la manĝotabloj kaj en la koridoroj rimarkas ion: ĉiuj, kiuj venis certe plibonigis sian Esperanton dum la tagoj en Esperantujo. Eble perfektigo estas celo, kiu restas al vi fora, sed se vi revenos al NASK, ĝi neniam estos al vi neebla.

Tamen, ni ne plibonigis nian Esperanton per pena, streĉa laboro—ni multe ĝuis la sperton. Kiel mi scias tion? Estis mi, kiu provlegis la kontribuaĵojn al tiu ĉi almanako kaj elektis ĝiajn fotojn! Mi scias, ke vi parolis pri aferoj tre diversaj, kreeme elpensis rakontojn kaj poemojn, fotis kaj fotiĝis, kaj eĉ provizis nin per receptoj por pico!

Mi esperas, ke ĉiuj el vi konservos tiun ĉi almanakon kiel belan memoraĵon pri nia komuna semajno dum NASK. Eble vi legos ĝin en la aviadilo aŭ trajno survoje hejmen (bonvolu ne provi legi kaj stiri aŭton samtempe!). Eble vi metos ĝin en skatolon kaj ne legos ĝin dum jardekoj.



Sendepende de tiam, kiam vi legos ĝin, ĝi povos reporti vin al Ralio kaj al nia komunaj tagoj tie ĉi.

NASK havas longan historion—kaj ankaŭ belan, helan estontecon antaŭ si. Nun la ĉi-jara kursaro estas historio, sed vi ĉiam povos reveni al NASK por plia vizito al Esperantujo kaj plua lernado. Ĝis tiam, paliativu la postkongresan sindromon per la enhavo de tiu ĉi almanako...

PRI LA FOTOJ DE BILL MAXEY

Ĉu nia mondo konsistas el difinitaj objektoj, aŭ ĉu nin ĉirkaŭas ĥaosa eksplodo de koloroj, kiun niaj okuloj strebas fiksi en kompreneblajn formojn? En sia prezento de siaj fotografoj, Maxey parolis foje pri la objektoj, kiujn li fotis. La fotoj mem prezentas al la rigardanto unuavide abstraktan pentraĵon, ortangulan kolorujon. Jes, ili montras objektojn: kio, krom objektoj, spegulas foteblan lumon? Tamen la objektoj ne estas la temoj de la fotoj, sed pli ĝuste kvazaŭ solvoj, ofte nediveneblaj, al la enigmo pri la estiĝo de la foto.



Kio okazas, kiam ni rigardas tian foton? La okuloj ekludas, sonĝante per koloroj. Jen la terura leonvizaĝa anĝelo, kies apero frostigas la sunlumon. Jen la perlamota arbo, kies suko nutras la grundon de foraj planedoj. Ĉu al sonĝoj mankas senco? Ĉu la koloraro, kiun Bill fotas - plej ofte nur du aŭ tri ordigantaj ĉefkoloroj - ne provizas nin per la sugestia scenejo, ĉe kiu la kirlantaj nuancoj videbligas la historion de la fotitaĵo?

La songôj ne konsistas el sensencaj cerboperturboj. Ili estas la eĥoj de la mondo, nia sencobunta mondo. La objektoj de la fotoj de Maxey aperas ne per siaj formoj, sed per siaj historioj, dumtempe solidigitaj per lia kamerao.



Vidinte en liaj fotoj la idealan enhavon de konkretaj objektoj, eble ni ankaŭ pli bone kapablas rekoni la realajn objektojn kiuj montras sin, nerekoneble, en la abstraka arto. Ni pretas trovi la ĉiutagan realecon en la pentraĵoj de artistoj kiel Kandinsky kaj Rothko. Almenaŭ, mi kredas ke ĉiuj, kiuj atente ĝuas la fotojn, tuj vidos la belajn sonĝerojn kiuj troviĝas ĉirkau ni, kaŝitaj en eĉ la plej solidaj, kaj en la ŝajne plej sensencaj, objektoj.

Laŭrenco Kenny



ESPERANTO KAJ MI

Esperanto estas la lingvo internacia, kiun kreis Ludoviko Lazaro Zamenhof. Esperanto-parolantojn oni nomas esperantistoj. La lingvon kreis L.L. Zamenhof en la jaro 1887. Ĝi estas logika kaj unika; oni povas interese lerni kaj kompreni ĝin plej facile.

Esperanto-parolantoj en la mondo kreskas ĉiun tagon, sed multaj homoj ankoraŭ ne scias pri ĝi. Ĉiujare ĝi havas internacian kongreson en aparta lando. Ankaŭ ĉiuj landoj havas sian landan kongreson kaj aliajn eventojn. Ĝi havas riĉajn kulturojn, librojn, lernajn instrumentojn, kaj tiel plu.

Mi eklernis Esperanton en 1990, kiam venis instruisto el Pollando por instrui kaj propagandi la lingvon; lin sendis UEA. Post la kurso, ni fondis Nepalan Esperanto-Asocion, do mi estas unu el la fondintoj de la asocio, kiun ni nomas mallonge NEspA. Mi havis multajn postenojn kaj de 10 jaroj mi estas la prezidanto de la asocio. NEspA sukcesis aliĝi al UEA en 2006 dum la UK en Florenco, Italio. Post tio, mi estas la unua KAEMano de Nepalo.

Ni aranĝas Himalajan Renkontiĝon ĉiun duan jaron kaj ankaŭ okazigas specialajn ekskursojn la ceterajn jarojn. La Himalaja Renkontiĝo okazas ekde 1995 por grimpi en la montaroj, kaj ekzistas ankaŭ Speciala Ekskurso ekde 2014 por tiuj, kiuj ne povas aŭ ne volas grimpi, sed volas vojaĝi al Nepalo. Per aŭtobuso ni aranĝis vojaĝojn al diversaj belaj lokoj. Ĝis nun, ĉiuj partoprenantoj ŝatis ĝin; kelkaj partoprenis pli ol du fojojn, ĝuante ĝin harmonie.

Pere de Esperanto mi vojaĝis tra la mondo kaj amikiĝis kun geamikoj de diversaj landoj. Kompare kun aliaj virinoj de mia lando, mi sentas min bonŝanculino, ĉar ili kun mirinda intereso rigardas min. Tio signifas, ke mi havas riĉan lingvon por igi min mense riĉa. Do nuntempe mi espereble vidas kaj pensas, ke ĝis mia morto mi lernos Esperanton, uzos ĝin, helpos pere de ĝi, kaj ĝuos ĝin.

Indu Devi Thapaliya

Mia kara, kiel vi ja mankas al mi! Kiel mi sopiras viajn lipojn kontraŭ la miaj, viajn brakojn ĉirkaŭ mi! Mi memoras, kiel ni povis pasigi senpene multajn horojn nur parolante, kiel ni ŝajnis ĉiam kompreni la pensojn unu de la alia, kiel ni estis kelkfoje kvazaŭ unu sola menso. Kaj mi memoras, kiel vi parolis pri nia komuna estonteco; devis temi pri eta kabano en la alpoj, kaj tri infanoj, kaj ni bredus ŝafojn. Kiel mi povis tiel perdi la racion, mi neniam scios. Temis pri nur malgrava disputo...nu, kara, mi ja bedaŭras, ke mi mortigis vin.

Zerbie Hynson

LA ĈASADO

Ne pluvis. La bestaro foriris plejparte por serĉi akvon kaj manĝaĵon. Walungu malsatis. La greno malaperis. La grundo sekiĝis pro forta sunlumo. Ĉio grizis kun polvo. Subite krio leviĝis el arbustaro sude de la vilaĝo. Kaba bubalo aperis. Ĉasistoj kurigis la bubalon al la centro de la vilaĝo. Viroj rapide grimpis en la sekajn arbojn, ĉiu kun sia lanco. Blankulo same supreniĝis, sed kun sia fusilo. Venis la mortigota bubalo. Ĉiu ĵetis sian lancon. Ĉe la lasta arbo, fine falis la kaba bubalo. Nur kuglo penetris ĝian korpon.

Rimarko de la aŭtoro: Tio ĉi estas vera rakonto de io, kio okazis en 1970 en sudokcidenta Tanzanio kiam mi estis tie kun mia fratino. Ŝi estis akuŝistino kaj mi estis ŝia helpantino. Tamen, kiam ĉi tio okazis, la viroj ne permesis al la virinoj kaj infanoj alproksimiĝon al la okazaĵo.

Elizabeto Dorcas

ESKAPO EN TURKIO

Ni sidas sole surbenke atendante aŭtobuson al la Usona arema bazo ekster Ankaro, Turkio. Mi timas atakon de rabistoj, ĉar miaj amikoj jam reiris bazen.

La suno subiras. Nokto venos.

Turkoj preterpasas. Ĉu nekonatoj ŝtelos miajn usonajn dolarojn? Junulo trans la strato fiksas siajn okulojn al mi! Nun surstrate restas nur li kaj mi. Li alproksimiĝas kaj sidas sur "mia" benko.

Mi ĉirkaŭrigardas. Mi planas mian eskapon.

Li malfermas la buŝon kaj angle demandas, "Kio estas la ĉefurbo de Turkio?"

"Kion?" mi respondis kun surprizo.

Li klarigas, "Ne maltrankviliĝu. Mi nur volas ekzerci min pri la angla lingvo!"

Filipo Dorcas

VAZFLUTO

Antaŭ miloj da jaroj, iu prahomo trovis oston, eble sur la planko de kaverno. Ĝi estis granda osto, plej certe femurosto. Ĉu ĝi estis besta aŭ homa, ne gravis. La prahomo fajfis pri tio. Laŭvorte li fajfis, ĉar kiam li hazarde blovis trans la malferman finon de la osto, li vole-nevole elpensis la unuan muzikilon. Tiu muzikilo estis speco de fluto. Kun unu fino ŝtopita, ĝi estis tia fluto kiun ni hodiaŭ nomas "vazfluto". La plej konata vazfluto estas la okarino. Estas pro ĉi-tio ke sciencistoj pensas ke la okarino estas la plej antikva muzikilo.

Todd Moody

AVIDO

En sia lukse varma hejmo, ĝi sentas sin sekura, komforta. Super ĝia kapo nenio minaca videblas; nur foliaj susuroj aŭdiĝas.

Kviete paŝas sube portanto de granda strangaspekta aparato. Subite ĉesas la paŝoj; serĉante la ĉielon, li retenas sian spiron. Direktinte la aparaton al duonmorta arbobranĉo, li kaptas belegan, ĵus albranĉiĝintan pegon. Kia bonŝanco! Ĝi eĉ ne forflugas rapide, kiel kutimas pri tiaj estaĵoj.

Ene de la apuda trunko, neatendite nigriĝas la ĉielo. Dolorego, blindiga sunlumo, barakto, senesperiĝo.

Semajnon poste la fiera fotisto rivelas sian majstroverkon, ok perfektajn fotojn de arba raneto, kruele kaptita kaj forportita de malsatega pego.

Ruth "Margo" Kevess-Cohen

MIKRONOVELO

Kion mi faru? Duboplene, mi tajpas variajn frazojn, demandante min, kion precize mi diru al li. Per fingroklakoj, variaj malnetoj aperas sur mia ekrano.

Finfine, post iom da pensado, mi tajpas, "Feliĉan naskiĝtagon, Otto! Kian kukon vi volas hodiaŭ? Aldone, mi ŝatus iam preni vin al drinkejo. Alternative, ni povus tagmanĝi kie ajn vi volas. Mi fieras pri vi." Mi alklakas la mezan butonon de mia klavaro. Mi fermas la klaptelefonon kaj enpoŝigas ĝin.

Mi sentas la poŝtelefonon vibri. Mi avide eltiras ĝin kaj eklarmas legante la respondon.

"Ne portu al mi kukon. Ne kontaktu min denove. Havu bonan tagon."

Barbara Brown

ESPERANTO KAJ NEPALO

Nepalo kaj Esperanto havas rilaton ne nur lingve sed per la libro verkita de Tibor Sekelj titolita Nepalo Malfermas la Pordon. Ĝi estis verkita en 1957 kaj la verkisto skribis pri kulturo, historio, lingvoj kaj homoj. Post la jaro 1950a, la tiama reĝo Mahendra malfermis la pordon por ke eksterlandanoj venu al Nepalo. Antaŭe, eksterlandanoj ne rajtis viziti Nepalon. Sendube, multaj eksterlandanoj vizitis Nepalon kaj skribis librojn sed la libro verkita de Sekelj estis skribita tuj post tiam, kiam Nepalo malfermis la pordon al la eksterlandanoj. Eble, tial li nomis sian libron Nepalo malfermas la pordon.

La nepala lingvo apartenas al hindeŭropa lingvaro kaj plejparte vortoj kaj ankaŭ frazoj en Esperanto devenas de la sama familio. Ekzemple, la ciferoj en Esperanto unu, du, tri kaj kvar en la nepala lingvo estas ek, dui, "tin" kaj ĉar. Sep, ok, naŭ, kaj dek similas al nepalaj ciferoj sat, aat, naŭ kaj das. Ankaŭ kelkaj aliaj vortoj en Esperanto similas la nepalajn, ekzemple, raĝa por reĝo, sarpa por serpento kaj muso por muso Do, ni sentas nin pli hejme en Esperanto ol aliaj azianoj ekzemple ĉinoj, koreoj kaj japanoj.

Bharat Kumar Ghimire



LA ĈARLSTONA PADELŜIPA REGATTO

De la 30-a de Junio ĝis la 4-a de Julio en Ĉarlstono, la ĉefurbo de Okcidenta Virginio, okazis granda festivalo nomata Padelŝipa Regatto (angle Sternwheel Regatta).

Padel-ŝipo estas boato kiu moviĝas per grandaj padel-radoj en la malantaŭa parto de la ŝipo. La boato uzas vapormotoron por movi la radon, kiu kutime estas ruĝa.

Fondita en 1970, la ĉiujara evento prezentas muzikon, manĝaĵon, amuzajn ludilojn, artfajraĵojn kaj kompreneble, multajn padel-ŝipojn.

La evento estis nuligita en 2008, sed revenis pasintjare en 2022. Ĉi-jare ludas multaj muzikistoj, inkluzive de "Flo-Rida", "Red Line", "Kool & The Gang", kaj eĉ pliaj!

Kvankam la evento okazas ĉe la riverbordo plejparte, ĝi transformas la tutan urbon.

Vinĉjo Allison

MIKRONOVELO

Tra fenestro, butikposendanto rimarkis la saman senhejmulon Johano, kiu ofte dormis sur la perono de apuda vendejo, sed kiu neniam ĝenis iun ajn. Kun la viro estis sep hundaĉoj kiuj protektis lin. Nova urba leĝo kontraŭ tiaj homoj ĵus ekvalidis, do la butikposedanto telefonis al la policanoj, kiuj, sen iu ajn pli grava tasko, sendis kvar aŭtojn por certigi, ke ili kaptos la malriĉan, sed sendanĝeran stratulon. Post serĉado ĉie, la policanoj ne trovis lin. Johano ŝajne malaperis de la najbarejo. Monaton poste, la butikposedanto rimarkis ion malĝojan kaj ĉagrenan. Mankis al li eĉ unu kliento post la foriro de Johano.

Chuck Mays

NE SUPOZU, KE VI VENKOS

Mi ŝatas vidi aŭstraliajn, buntajn papagojn. Por allogi ilin, mi ofertas manĝaĵon faritan de sunfloraj semoj, faruno kaj mielo, hejmfaritan en formo de sonorilo kaj ofte vidas ilin. Ĝene, ĉiun nokton la birdmanĝaĵo malaperas. Post esploro dum semajnoj, mi malkovris la ŝteliston. Didelfo, en la tre malfrua mateno, venas kaj manĝas, ĝis nenio restis. Do, mi pendigis la sem-sonorilon sub longa, tre maldika drato. Malsukceson! Tri pliajn fojojn mi klopodis trovi aranĝon por venki la ŝajne ne tre inteligentan beston. Finfine mi rezignis. La milionoj da jaroj de evoluo gajnis. La solvo? Nokte mi kaŝas la sem-sonorilon en la domo.

Chuck Mays

MIKRONOVELO

Baldaŭ mortos niaj lastaj arbaŭskultantoj. Tion mi scias. Kia junulo eltenus eĉ jaron la paciencan atendadon, esperante eble aŭdi unuopan vorton, dum la aliaj samaĝuloj plenigas sin je vortoceano? Ni disvortigemuloj disponas bufedon; kelkcent neplaĉajn vortojn mi forĵetis ĉi-matene. Kiu kapablas kredi je vorto, kies riĉo sufiĉus por anstataŭi la sumon de nia mirinde multiĝanta tumulto? Mi jam delonge ne plu povas revoki al la memoro la tralignan ventan voĉon, kiu iam ŝajnis ĉirkaŭflustri mian avinon kaj min. Klare mi nur memoras ŝiajn sendentan rideton kaj sopirantajn okulojn, kaj nian subitan komprenon, ke ŝi foriros kune kun la aŭtunaj folioj.

Laŭrenco Kenny

LANDLIMO

Rigardante la landlimon, la okuloj doloras min. Supren, la suno brulas kaj mi ŝvitas. La areo sufokas min. Mi apenaŭ ne povas respiri. La vento forte blovas sablon kiu malpermesas min vidi bone la lokon, Kiu ĉagrenas min. Ĉiuokaze mi ne povas ĉesi rigardi ĝin. Mia soifa gorĝo krias, sed neniu aûdas mian tristan, mizeran kaj sekan krion. Mi aûdas disonancan kaj bruan muzikon. Malsamaj ritmoj kaj melodioj ludas dekstre kaj maldekstre.

La fantomo metas sian piedon en la fluon inter la du mondoj.

Mi fermas la okulojn kaj revas pri alia mondo. Tie mi trovas mildigon kaj esperon.

Karlo Germany

PLI PRI GRAVITAJ ONDOJ

Antaŭ kelkaj jaroj, mi skribis artikolon pri la longaj gravitaj ondoj kaŭzitaj de la kolizio de du nigraj truoj. La gravitaj ondoj estis detektitaj per Lasera Inerferometra Observejo de Gravitaj Ondoj (angle: LIGO), kiu ekzistis en tri lokoj cirkaŭ la mondo. Gravita ondo periode mallongigas la distancon inter du el la kvar speguloj de la instrumento. Tia interferometro devas esti tre granda. Ĉiu brako de la instrumento estas 4 kilometrojn (2,5 mejlojn) longa. Sed nun sciencistoj de Nord-Ameriko observejo komencas raporti detekton de tre longaj gravitaj ondoj.

Sed tiuj observoj ne venas de interferometroj. La observoj venas de la studo de la rotacia frekvenco de pulsaroj (pulsantaj steloj). Ili kredas ke la longaj gravitaj ondoj estas kaŭzataj de la vibrado de supere masivaj nigraj truoj.

Albert Einstein unue proponis gravitajn ondojn en 1915. Ili estis fizike konfirmitaj en 2016. Nun ni vidas plian progreson pri gravitaj ondoj. Kio venos estonte?

Fred Meyer III

RAKONTO

Sepideh timas bestojn. Ĉiujn bestojn. Eĉ sciurojn ŝi timas. Eĉ tamiasojn. Hundojn, kompreneble, ŝi timegas. Antaŭ mia eta hundo, kiu aspektas kiel ludilo, ŝi tremis kunikle. En Irano, ŝi diras, hundoj estas ne dorlotataj, sed sovaĝaj.

Mi volis konduki ŝin al bela loko por marŝado, sed kien? Ĉie, kie oni marŝas, oni marŝas kun hundoj. Tiam mi pensis pri la fama Kŭabina lago. Pro tio, ke ĝi estas trinkakvujo, hundoj malpermesatas.

Ni atendis la alvenon de printempo. Venis printempo, kaj ni atendis la finon de Ramadano. Poste ŝi feriis, poste ni atendis aliulojn...

Finfine alvenis la tago. Dum preskaŭ horo ni veturis al la norda limo de la lago. Ni eliris la aŭton kaj vidis la vojon antaŭen. Kaj en tiu unusola loko kie oni malpermesas hundojn, kio rigardis nin?

Urso.

Mara



Flugrevon ni kunportas
Ja ĉiam en la kapo,
Karese alteriĝi
Ni volas sed sen frapo.

Ŝila Devlin

PRI LA KOSMO DE JOHN ISLAY FRANCIS

Post 70 jaroj la poemciklo *La kosmo* de John Islay Francis (1924-2012) restas inter la pintaj atingoj de la Esperanta literaturo. Konsistante el 71 strofoj de po kvar versoj, ĝi priskribas objektive la tutan (sendian) historion de la universo, ekde la apero de materiaj praeroj en la silenta "nigro de nenio" ĝis la estingiĝo de la lasta astroradio. Per ĝiaj kvin partoj—kiujn oni rajtus trafe nomi kantoj—la leganto atestas pri La komenco, La kreo, La evoluo, La morto kaj La fino de la mondo.

Ĉiu verso montriĝas tiel klare kaj detale plumĉizelita ke pentristo povus facile transformi ĝin penike en perfektan ilustraĵon. La senmankaj aleksandroj liveras plaĉan ritmon kaj melodion, kaj la konstanta fluo de asonanco kaj aliteracio evidentigas lertan atenton al la sonkarakteristoj de la zorge elektitaj vortoj. Iel la elementoj kunefikas tiel, ke la leganto fizike sentas kaj la komencan kirliĝon kaj eksplodan energion de la krea procezo kaj la vastegon de senlima spaco. Ĉi tiu ĉefverko ĉiel montras sin rava kaj leginda artaĵo de aŭtenta majstro de la poezio.

La kosmo estas havebla en la reto: tinyurl.com/lakosmo

Bill Maxey



JEN LA UNUA TAGO DE MIA NOVA POSTENO ĈE VOLFRAMA MINEJO DE KANADO (CANADA TUNGSTEN MINES)

La ĉefo de la geologia fako antaŭdiris tion, ke mi devos raporti pri la diligenteco de la tri geologiaj studentoj kiujn mi akompanos dum la labortago. Ĉu mi iĝu spiono? Helikoptero flugigis nin al la neĝa nivelo de la monto. La piloto surteriĝis, ni eliris, kaj li foriris. Mi sekvis malantaŭ la studentojn kiuj portis la elektromagnetajn termezurilojn . Subite mi vidis lagopon kiu staras senmove kaj fiksrigardis min. Mi rapide sentis min ĉasisto, sed kiel kapti ĝin? Mi faris neĝpilkon, ĵetis ĝin en tiu direkto, kaj maltrafis. La birdo restis senmova kiel statuo. Ŝajne ĝi diris,"Mi ne gratulos vin pri via ĉaskapablo. Kial vi ne provu denove?" Bone. La dua neĝpilko faligis la birdon kaj mi tuj kuris ĉe ĝi kaj tordis al ĝi la kolon. Krak'! Liajn piedojn mi ligis al mia pantalono per ŝnuro je la talio, kovris ĝin per jako, kaj kuris al la tri studentoj kiuj demandis,"Kio okazis al vi?" "Kial vi demandas?" "Sangmakuloj videblas sur la vizaĝo" ili respondis. "Ho, ne gravas, mi simple kaptis mian vespermanĝon" Tiam ni ĉiuj forte laboris la tutan tagon. Dum la vespero, mi serĉis la ĉefon por doni raporton pri la bonega tago. Enirante la dormejan konstruaĵon por viroj, mi aŭdis viglan konversacion en iu ĉambro kun plene malfermita pordo. Mi enrigardis kaj la ekscitita babilado tuj haltis. Kiuj estis tie? La ĉefo kaj la tri studentoj. Mi fulmrapide foriris. Eble vi povas diveni pri kio ili babilis. La sekvan tagon, oni multe ŝanĝis miajn labortaskojn.

Ŝila Devlin

KION MI FARIS ANTAŬ NASK?

Je la tria posttagmeze vendredon, mi estis preta por foriri al NASK. Mi tuj elŝutis mian laborejan komputilon, metis la valizon en la aŭton, kaj ekveturis.

Mia unua halto estis Lebanon, Pensilvanio. Mi iom perdis la vojon kaj devis veturi sur kelkaj nepavimitaj vojoj. Bonŝance, mi fine atingis pli taŭgan ŝoseon kaj atingis la hotelon, kie mi pace tranoktis.

Sabaton matene mi vekiĝis je la kvina matene kaj vojaĝis tra Amiŝlando, la regiono de la Pensilvaniaj germanaj migrintoj. Mi havis tradician Amiŝan matenmanĝon kaj aĉetis tradician Amiŝan ĉapelon faritan el pajlo. Tiam mi veturis al Intercourse pro ĝia iom maldeca signifo en la angla.

iun nokton mi havis rezervitan ĉambron ĉe Sud-de-la-Landlimo en Sud-Karolino. Mi apenaŭ havis sufiĉe da tempo por veturi inter Penslvanio kaj Sud-Karolino. Sufiĉas, ke mi diru, ke la trafiko estis damne terura kaj mi preskaŭ perdis duonon de la luprezon de la ĉambro, kiun mi jam pagis - se mi alvenus malfrue, mi perdus ĝin.

Post kelkaj horoj, mi atingis la faman lokon Sud-de-la-Landlimo. Mi atendis malvizitindan ejon kaj ĝi ja estas tia. La plej agrabla afero estis la trinkejo, kie mi trinkis tro da tekilo.

Dimanĉon mi veturis al Raleigh senincidente kaj povis malstreĉiĝi antaŭ la komenco de la kurso.

Jonathan Thomas

KIU ESTIS MOROJO?

Por la unua fojo en la historio de NASK (kaj la Landa Kongreso de EUSA), unu el la salonoj prenis la nomon "Morojo". Sed kiu ŝi estis? Kial ni havas salonon nomitan laŭ tiu persono?



Morojo - alinome Myrtle R. Douglas - bedaŭrinde estas pli bone konata ekster nia movado ol ene. Ŝi ekaktivis en la Esperanto-movado en Usono dum la 30aj jaroj, kaj samtempe en la frua sciencfikcia kulturo. Kun kelkaj aliaj Esperantistoj-sciencfikciuloj, ŝi partoprenis la 1an Mondan Kongreson de Sciencfikcio, kadre de la Monda Foiro de Novjorko de 1939, kie ŝi kreis kaj debutis la unuan fantazian kongresan vestaĵon. En 2016 la internacia ligo de kostumistoj rekonis ŝin kiel La Patrinon de Kongresa Kostumado. Alivorte, ŝi estas la praavino de kosplejo! Tamen, ĝis nun, neniu rimarkis, ke samtempe kaj samloke okazis usona kongreso de Esperanto, kaj Morojo ankaŭ tie debutis sian fruan kosplejaĵon!

Morojo estis ankaŭ tre aktiva en la fruaj 'fangazetoj'. Ŝia ĉefa fangazeto nomiĝis "Guteto". Ĝi ĉiam citis strofojn de la Zamenhofa poemo, kaj havis anoncojn pri kiel oni povas aliĝi al Esperantistaj organizoj.

Uzi la nomon de Morojo estis bona paŝo por rekoni niajn pionirinojn.

Brandon Sowers

ORIGAMIO EN ESPERANTUJO

Esperanto estas magia lingvo, kiu ebligas al ni interesajn internaciajn kontaktojn. Sed kiel ni trovu esperantistojn en foraj landoj, kiuj interesiĝas pri niaj plej ŝatataj hobioj kaj agadoj? En tiu ĉi artikolo mi raportas pri miaj spertoj kadre de "EsperOri", tre aktiva internacia grupo de afablaj homoj en diversaj landoj kiuj jam parolas Esperanton aŭ kiuj eklernas Esperanton pere de unu el miaj hobioj: origamio, la japana arto de paperfaldado.

Antaŭ jaro mi trovis tiun grupon en la retejo de eventaservo.org, kaj decidis viziti unu el la kunvenoj. Imagu mian surprizon, kiam mi eksciis ke okazas klera prelego kaj lerte prezentita origamio-leciono por pli ol 20 personoj el Francio, Brazilo, Rusio, Britio kaj pluraj aliaj landoj; mi estis la sola partoprenanto loĝanta en Usono. Dum la reta Zoom-kunveno Larysa Osadchuk, la fondinto kaj gvidanto de la grupo, foje interpretis kaj donis informojn pri Esperanto por partoprenantoj en Rusio kiuj ne bone konas Esperanton. Cetere, mi miris sperti afablan personan kontakton kun rusaj esperantistoj meze de la milito. Mi tuj aliĝis al la grupo kaj baldaŭ instruis mian unuan leciono pri origamio. Kia plezuro! Mi ĝojis pro la fascina prelegetoj, pro la amikema, kuraĝiga etoso en la grupo, kaj pro la sukceso de miaj lernantoj. Mi estis kaptita! Ekde tiu unu kunveno mi regule partoprenas kaj ofte instruas origamion tie.

Ĉiuj estas bonvenaj veni al la grupo EsperOri por partopreni aŭ eĉ nur por spekti la prelegeton kaj lecionon. Aliĝu al la Telegram-kanalo EsperOri aŭ sendu al mi retmesaĝon. Venu, faldu kaj ĝuu!

Ruth "Margo" Kevess-Cohen

Respondo: Ĵaŭ.

KURAĜO ĈION ATINGAS. [#1222 EL LA PROVERBARO ESPERANTA DE L. L. ZAMENHOF.]

Ekde tiam, kiam mi alvenis en Raleigh la 2-an de Julio (mia trajno, 'the Carolinian' de Amtrak, malfruis du horojn), mi estis zorgema pri kiel bone aŭ malbone iĝos mia sperto ĉe NASK. Kvar tagojn poste, estas evidente, ke mi zorgis pri nenio!

La gvidantoj ĉiam estis helpemaj kaj diligentaj pri siaj celoj por la lernantoj senkonsidere de ties propraj niveloj. Rezulte de tio, mi sentas min pli memfida kaj en la klasĉambro kaj kun la hejmtaskoj rilate al mia nivelo.

Alivorte, la NASK-estraro donis al mi la kuraĝon por fariĝi plena membro de la Usona Esperantujo. Por tio, mi estas tre dankema.

Mi ankaŭ estas dankema al mia plej bona amiko, Alena, kiu inspiris min ĉeesti NASK-n. Sen tio, mi eble ne farus la plej-longan vojaĝon trajne el la Longa-Insulo (Novjorkio) al Raleigh...

Philip David "Konstelacio" Morgan



KANTEBLA TRADUKO DE DAN YUAN REN CHANG JIU

Jenan kanton kantis originale Teresa Teng, kun teksto de la poeto Su Shi konata ankaŭ kiel Su Dongpo. Ĝin verkis la poeto kiam, en fora postenejo al kiu li estis sendita, li festis kun amikoj la mez-aŭtunan festivalon, sed pensis pri sia lontana frato. Almenaŭ per unu afero li povis konsoli sin, eĉ mil mejlojn for ili povis ĝui la belon de la sama luno. Mia traduko devis sufiĉe deflankiĝi de la laŭvorta senco por konformi al la melodio, tamen mi esperas, ke mi sukcese redonis la esencon.



De kiam estas lun'?
Kun en la mano vin'
demandas mi al ĉielo:
kiomas jar' ĉe vi?
Revas mi pri reensor'
sed alta hal' el marmor'
neelteneble fridus;
ekdancas kun mi ombr'
preter la tera viv'.



Halon, pordojn
maldormantojn
pribrilas ĝi.
Sen malico
tamen ĝi plenas, kaj mi sen vi.
Ĉe hom': renkontiĝ', disiĝ',
ĉe lun': kresko kaj malkresk'.
Malgraŭ tristo ĉi
trinku ni je l' san'
sub sama lunradi'.

Zerbie Hynson

En la vintro, oni dormas
En la printempo, oni vekiĝas
En la somero, oni laboras
En la aŭtuno, oni feliĉiĝas
Kiel la jaro, tiel la tago
Kiel la sezono, tiel la horo
Tempo pasas, pasas, pasas

Ema Bell



KION MI LERNAS EN NASK

Mi lernis du aferojn en la lastaj du NASKAJ kursaroj:

1. Ne timu. Ne gravas, ĉu oni estas eterna komencanto aŭ progresanto. Gravas nur, ke oni komunikas unu al la alia.
2. Aŭskultu, parolu, skribu, kaj legu multe, kaj PENSU en Esperanto. Ne provu traduki ĉion el via gepatra lingvo. Tio nur konfuzas kaj frustras.

Jen miaj epifanioj.

Tomaso Rusch

BONALINGVO

Ĉe NASK, bonlingvist'.
Sed fridujo necesas.
Varmo, fek' al ci.

Enriko Haro Marquez

ENIGMO

Ne havante buŝon, mi parolas.
Ne havante orelojn, mi aŭdas.
Ne havante korpon, mi flugas tra la aero.
Kio mi estas?

Nikolao LeBlanc

FAJROBIRDO

La majesta fajrobirdo flugis alte en la ĉielo.

"Ho, fajrobirda moŝto!", petegis kamparano kiu vidis ĝin. "Ni malvarmas, kaj vintro venas. Ĉu vi bonvolus regali nin per via varmo? En nia domo bruliĝu fajro."

La mita estaĵo jesis faligante flamantan plumon rekte en la kamentubon de la kamparano, kiu ĝojis danke.

Vidinte la okazintaĵon, iu najbaro kriaĉis siavice: "Hej! Birdo! Ankaŭ mian domon bruligu fajro!"

La besto faligis unu el siaj flamantaj plumoj rekte sur la pajlan tegmenton de la najbaro, kaj la domo cindriĝis postnelonge.

"Nu, ekde hodiaŭ li memoros kiel uzi -ig kaj -iĝ", kontente pensis la fajrobirdo.

Jorge Rafael Nogueras

MIA SPERTO DUM NASK

Mia plej bona sperto ĉe NASK estis la interkona vespero kaj la gufujo tuj poste. Mi persone renkontis multajn homojn, kiuj instruis min en Esperanto: Vinĉjon (Vince Allison), Rafan (Rafael Nogueras), Alekson (Alexander Vaughn Miller), Enrique Marquez, kaj Margon (Ruth Kevess-Cohen). Mi ankaŭ persone renkontis aliajn studentojn, kiujn mi antaŭe renkontis interrete (Simonon, Psy, LeeArron, Hermes, Jonathan, ktp). Pardonu min se mi forgesis inkluzivi vian nomon. Mi antaŭĝojas renkonti pli da esperantistoj dum la Landa Kongreso ĉi-semajnfinon.

Parenteze, mia Esperanto multe pliboniĝis dum mia vojaĝo! Mi estos pli memfida, kiam mi renkontos aliajn esperantistojn en la estonteco.

Ankaŭ dankon al Gario (Gary Bisaga) kaj Karlo (Carl Mays) pro via laboro por sukcesa NASK ĉi-jare!

Colin Dunn

MIA PLEJ MALĜOJIGA MOMENTO EN ESPERANTUJO

Nia lasta vojaĝo al eksterlando estis en 2019 por partopreni la Universalan Kongreson en Finnlando. Ni ses Nepalaj Esperantistoj (Prakash, Bharat, Indu, Sitaram, Tuka kaj mi) planis partopreni la 104-an UK en Lahtio, Finnlando kaj laŭ la plano ni decidis vojaĝi tra Siberio. Ni ekvojaĝis tra Ĉino. Ĉinaj esperantistoj ĝoje akceptis nin en Pekino. Ni restis tie 3 tagojn kaj poste nia grupo ekiris al Mongolio. Niaj grupanoj ekscitiĝis pri la vojaĝo per trajono kaj buso eĉ en nova lando. Adiaŭis nin la ĉinaj esperanistoj kun bondeziroj por la plua vojaĝo. Ni per aŭtobuso kaj poste de la landlimo taksio atingis al Ulanbatoron. Lokaj esperantistoj akceptis nin kaj aranĝis gastejon por ni. Ni dankis al ili kaj ankaŭ al Esperanto pro tio, ke ni povis vojaĝi tien. La lokaj esperantistoj gvidis nin dum du tagoj. Ni tre ĝojis. Sed unu tagon antaŭ nia plu vojaĝo al Rusio, nia amiko Sitaram vekis min meznokte je la 2a horo. Unue li diris, ke li havis problemon pri sia enspirado. Kaj poste li diris,ke lia koro ege doloras lin. Ni telefonis al lokaj esperantistoj; bonŝance ili tuj akceptis nian vokon. Ili aranĝis la ambulancon. La ambulanco venis iom malfrue ĉar ĝi iris al la malĝusta loko. Kiam la ambulenco alvenis , la kuracisto ekzamenis nian amikon kaj li diris ke nia amiko jam forpasis. Post la deklaro de la forpaso, mi demandis min, ĉu mi ŝonĝas aŭ tiu evento estas vero. Ni ĉiuj kriis, ploris. Policanoj venis por preni nin al policejo kaj la kadavro de nia amiko estis portita al hospitalo. Tiu evento estis tre terura kaj neforgesinda evento en mia tuta Esperantista vivo. Poste, S-ro Bharat portis la kadavron al Nepalo kaj ni daŭrigis nian vojaĝon plu al Rusio kaj Finnlando por la UK.

Yugal Bhattarai

KIEL MI LERNIS ESPERANTON

Mi unue aŭdis pri Esperanto kiam mi estis infano. En 2017 mi lernis la hispanan kaj mi vidis Esperanton en Duolingo. Mi eklernis Esperanton kaj ankaŭ la hispanan. Mi finis la plej grandan parton de la kurso, sed mi ne finis gin. Mi ĉesis lerni lingvojn dum kelka tempo kaj mi forgesis multajn Esperantajn vortojn. En 2021, dum la pandemio, mi eklernis Esperanton denove. Mi ŝatas la historion kaj principojn de la lingvo Esperanto, kaj ke ĝi estas facila. Mi deziras, ke Esperanto havu pli da filmoj, por ke mi povu spekti pli. Mi eksciis pri NASK el la jutuba kanalo de Alekso (Esplori Esperanton). Dankon al NASK, ke mi estas ĉi tie nun!

Elliott Killian

MIKRONOVELO

Vekis min bruo meznokte. Kato fekis. Almenaŭ duone. Haron mian li glutis, kaj ĝuste tiun haron li nur duone fekis. Skrapado. Karambolo. Miaŭo. Pendante per la haro, svingiĝis peceto da fekaĵo. Zorgante ne tuŝi la bulon, mi kaptis la katon. Li luktis. En la necesejo, mi trovis la tondilon tiucele destinatan. Li rezistas. Kvankam li suferas, helpon li ne volas. Per unu mano mi tenis lin firme. Per la alia mi delikate dekatenis la katon.

De tempo al tempo mi pripensas tiun nokton, kiam mi sentas min kato portanta sian fekaĵon per duonfekita haro.

Kartero Williams

RECEPTO POR PICO

Kiam komenciĝis la pandemio en 2020, multe da homoj devis resti hejme por konservi la sanon de siaj najbaroj. Tial, sen la kutimaj okazoj de la laboro, la preĝejo, aŭ la amikoj, kelkaj homoj interesiĝis pri hobioj kiel trikado, lingvolernado, kaj bakado. Pro ĉies nova deziro eklerni bakadon, gisto troveblis nenie en iu ajn supermerkato! Pro tiu manko, mi trovis recepton de pico-pasto kiu ne enhavas giston. Ĝin mi donas nun al vi! De tiam, mi bakis tiun ĉi paston pli ol centfoje - minimume po unufoje ene de du semajnoj. Mi esperas ke ĝi plaĉas al vi same kiel al mi!

INGREDIENCOJ

Por la pasto

- Faruno, ⅓ taso
- Bakpulvoro, ½ kulereto
- Salo, ½ kulereto
- Ia lakto (de bovino, migdalo, kukoso, ne gravas), ½ taso
- Olivoleo, 2 kuleroj

Por garnaĵoj

- Saŭco de Tomatoj, 1½ tasoj
- Fromaĝo raspita, 1 taso
- Aliaj surhavaĵoj, ekzemple: tranĉita verda kapsiko, banano-kapsiko, tomatoj tranĉitaj, spicoj, ktp

Iloj

- Forno
- Bakpleto
- Bovlo



INSTRUKCIOJ

1. En bovlo, miksu la farunon, bakpulvoron, kaj salon
2. Aldonu la elektitan lakton kaj olivoleon, kaj miksu denove ĝis la tuto estas miksita. Kiam ĝi estos kohera, hejtu la fornon ĝis 400 gradoj Farenhejtaj.
3. Dum la atendado, per iom pli da oliv-oleo, malsekigu la facon de la bakplejto.
4. Sur puran tablon, metu paston. Platigu ĝin, per ilo aŭ manoj, ĝis ĝi formas platan cirklon, proksimume en la formo de la bakpleto sed iom pli granda.
5. Metu la platigitan paston sur la bakpleton, kaj poste, metu ambaŭ en furnon. Baku 8 minutojn.
6. Kiam vi atendas, tranĉu/preparu viajn elektitajn surhavaĵojn.
7. Post la bakado, elprenu la bakpleton kaj aldonu saŭcon, fromaĝon, kaj la garnaĵojn. Baku la tuton denove dum 15 minutoj.
8. Poste, jen pico! Atendu minuton por ne bruligi vian langon, kaj ĝuu!

Simon Smith

RAPORTO PRI NASK

Ĉi-jare mi havas la grandan plezuron povi ĉeesti NASK. Mi ĝuas multe da aferoj pri NASK. MI povas plibonigi mian esperanton, vidi la urbon Raleigh, kaj tiel plu. Sed la parto de NASK, kiun mi plej amas, estas miaj novaj amikoj. Ĉiuj estas mirindaj. Mi invitus ĉiujn de ili en mian domon por gastigi ilin. Mi esperas, ke mi povos ĝui ilian amikecon dum la cetero de mia vivo.

Mi estas David Beck kaj mi aprobas ĉi tiun mesaĝon.

David Beck

HAJKOJ DE POSTBAZANOJ

En la muzeo
la pentrita vizaĝo
ankoraŭ ridas

Julie

Vi volis pacon
Via movado vivas
kaj la animo

Homoj kuniĝas
ĉar vi havis ideon
mi estas laŭda

Carrie Jones

Mi uzas ilojn.
Kelkaj ne estas iloj
sed substantivoj

Robert Mackie

Dankon pro lingvo.
Mi tre ĝojas lerni ĝin
por interesa vivo.

Connie Moody

Zamenhof ŝajnas
Viro inteligenta
Kaj tre afabla

Sandra Haber

Varmega tago
Tie la suno brilas
Mi estas varma

La samaj vortoj
Zamenhof volas, ke vi
Faru mondpacon

Wendy



Kara Zamenhof,
Ĉu vi havas infanojn,
Kiujn vi amas?

Estas verda bird'
En la barb' de Zamenhof
Kion ĝi faras?

Kiam Zamenhof
Foriris por prelegi,
Li portas ĉapon.

Kiom da ligno
Marmoto povus manĝi
Se ĝi manĝus ĝin

Adamo diras
La vortojn Esperantajn
Por sia patro.

Thom Illingworth



parolata ĉie
estiĝis Esperanto
kaj ni vartos ĝin

Anonima

Mia fratino
Forpasis sed ankorau
sentiĝas kun mi

La suno brilas
Kaj nun bakas la mondon
Ĉu ni travivos?

Constance Moody

Jen la problemo
Igluo aŭ glacidomo?
Vere, la dua

Ĉu vi vidas ĝin?
Kolorojn en la tero?
Revidu, kara.

Kristin Haber

LETERO AL ZAMENHOF

Kara d-ro Zamenhof,

Mi volas diri al vi ke vi estis bonega, grava viro.

Mi amas vian ideologion. Mi pensas ke internacio dua lingvo povas helpi la mondon. Mi pensas, ke vin povus esti malfeliĉa se vi sciius la problemojn en nia mondo.

Sandra Haber



VOJAĜOJ AL NASK

Mi foriris el mia hejmo. Mi devis fari kelkajn aferojn antaŭ ol mi povis iri al NASK. Mi iris per aŭto al neprofitcela firmao. Tie troviĝis kvar seruroj. Tiuj seruroj defendis la kvaran klimatizilojn de la konstruaĵo kontraŭ ŝtelistoj. Mi tranĉis la kvar serurojn. Mi ne tranĉis ilin ĉar mi volas iĝi ŝtelisto. Tamen, mi tranĉis ilin. La klimatiziloj ne funkcias. Neniu havis la ŝlosilojn. La riparisto ne povis ripari ilin sen ŝlosiloj.

Poste kiam mi tranĉis la serurojn, mi almetis novajn serurojn al la klimatiziloj. Ni havas la ŝlosilojn. Nun, dum mi estas ĉe NASK, la riparisto povas ripari la kilmatizilojn.

Post tio, mi iris al la domo de mia amiko. Li riparas aŭtojn. Mi lasis mian aŭton ĉe lia domo. Tiam mi marŝis al proksima trinkejo, kie mi atendis mian edzinon. Ŝi veturigis min al NASK de Cary. La tuta vojaĝo daŭris horon kaj duonon.

Robert Mackie

Mi venis al NASK per aŭto de alia urbo.

Unue, mi vizitis mian amikon per aviadilo. Antaŭe, ŝi logis proksime al mi sed nun ŝi loĝas en Hendersonville. Ŝi diris al mi, ke Hendersonville estas nur unu horon for de Raleigh. Sed, Hendersonville troviĝas kvar horojn for. Ŝi pensis, ke ŝi ne povas helpi min ĉeesti NASK. Ni estis maltrankvilaj.

Poste multaj horoj, ŝi trovis junan virinon, kiu veturigis min al Raleigh

Sandra Haber

Mi vojaĝis al NASK unue per aviadilo. Miaj gepatroj veturigis min al la flughaveno, kaj mi atendis tie du horojn, kio tre enuigis min. Mia unua aviado daŭris unu horon kaj poste mi alvenis al Pensilvanio.

Mi havis unu horon por tagmanĝi kaj uzi la necesejon, kaj mi ne finis mian sandviĉon kiam mi aŭdis la anoncon, ke mia aviadilo foriros! Mi devis fini mian sandviĉon en la aviadilo, kaj ankaŭ la dua aviado daŭris unu horon.

Poste, mi alvenis al Raleigh. Mi aĉetis ĉapelon en la flughavena vendejo kaj atendis ekstere. Mia senkosta aŭtobuso alvenis poste, kaj oni veturigis min apud la universitaton.

Fine, mi vojaĝis piede al la universitato. Mi estis tre laca, varmega, kaj nervoza kiam mi alvenis.

Kristin Bandy



PRI NIAJ HOBIOJ (DE LA MEZNIVELANOJ)

Mi alvenis ĉe "The Forge Initiative" je la 1a ptm. Mi kunportis miajn ilojn, miajn tranĉilojn, kaj miajn mezurilojn de mia aŭto kaj metis ilin sur tablon. Mi diris "Saluton" al ĉiuj membroj kaj gastoj, kiujn mi renkontis.

Knabo, kiu havas dek kvin jarojn, petis min helpi lin fari ion per la Perkomputila Cifereca Stiraĵo (PCS) - iloj, kiujn ni havas ĉe "The Forge Initiative". Li diris al mi, ke li jam havas sian ideon desegnitan per la onShape.com-a CAD-ilo. Li montris ĝin al mi. Ni ŝanĝis plurajn detalojn. Ni faris tion, ĉar ni povis pli rapide realigi lian objekton post la ŝanĝoj.

Kune, ni sidis antaŭ komputilo. Kune, ni uzis programajn ilojn por pretigi lian bildon. Tiam, ni alŝutis la dosieron en la ŜopBot PCSilon. Ni metis lignon sur la ilo. Ni fiksis la lignon, do la ilo ne povis movi la lignon tiam, kiam ĝi tranĉos la lignon.

Ni metis la klingon super la lignon. La ilo komencis moviĝi tra la ligno. Ĉiu movado fortranĉis iomete de la ligno. Fine, lia projekto finiĝis. Li povis vidi sian objekton kreitan el sia ideo per la PCS ilo.

Robert Mackie

Laŭ mi muziko estas agrabla ŝatokupo. Mi ludis pianon multajn jarojn, sed me ne ludis ĝin dum pluraj jaroj. Mi ŝatas krei kantojn por preĝejoj kantistoj. Mi ankaŭ ŝatas ludi sudokon, kiu estas nombra ludo. Ĝi estas bona por ekzerci la cerbon. Mi legas romanojn misterajn, kaj mi lernas kiel aĉeti domojn por luigi. Mi ankaŭ ŝatas fari artaĵojn. Mi kutime bakis diversajn panojn, sed mi akiris tro da pezo. Nun, mi ŝatas ekzerci min ĉe la gimnastikejo por atingi bonan sanon.

Thom Illingworth

Mi havas tiom da ŝatokupoj, inkluzive de kudrado, kuirado, legado, kaj kurado. Ŝajne mi ĉefe preferas ŝatokupojn, kiuj komenciĝas per la litero "K". Mi celo rilate kudradon estas scipovi kudri mantelon. Pri legado, iutempe mi esperas povi legi librojn skribitajn en Esperanto kaj la franca. Hieraŭ mi aĉetis Esperatan romanon la unuan fojon.

Anonima

Mi havas multajn ŝatokupojn.
Mi komponas elektronikan muzikon.
Mi kreas elektronikan arton uzante specialan programaron.
Mi kreas fantaziajn kaj sciencfikciajn verkojn.
Mi faras ĉiajn muzikojn per mia laborejo.

Wendy C

Mi volontulas por organazito kiu helpas maljunulojn. Mi estas la ĉefo de la estraro. Niaj volontuloj transportas homojn al superbazaro, kuracista rendevuo, kaj al aliaj lokoj.

Sen la organizaĵo multaj maljunuloj ne ricevos helpon, kiun ili bezonas. Mi fieras pro mia servo al la komunumo

Carrie Jones

Mia ŝatas ludi mian gitaron.
Antaŭ kvin jaroj, mi komencis lerni gitaron. Ne estas facile.
Laŭ mi, en ĉi tiu tempo en mia vivo, ne gravas ludi bone.
Jaŭde, mi ludas kun sep aliajn homojn.
Ludi amuzas nin.

Sandra Haber

Mi ne certas, ke mi ja havas hobion, almenaŭ ne laŭ tiu nomo, sed mi do havas multajn interesojn. Mi kutime legis multe kaj interesas min diversaj aferoj. Aparte de ĉio, mi sxatas boatojn.

Ni havas nun etan velboaton en Nov-Zelando. Ĝi estas iomete malnova sed ege komforta kun kuirejo, banĉambro, elektra necesejo, kaj hejtilo por la vintro. Ene ĝi havas multe da bela ligno.

Kie ni loĝas, oni povas foriri sur la maron la tutan tagon sen vidi alian ŝipon . . . aparte en la vintro, kiam la velboatoj kutime restas en la haveno. Bonsorte, la vintroj ne iĝas tro malvarmaj kaj neniam frostiĝas — do oni povas foriri al la maro iam ajn kiam oni elektus. Mi faras ĝin ofte kun mia edzino.

Plaĉas al ni esti sur la akvo, ĝuante la venton kaj la ondojn. Multfoje oni povas vidi delfenojn en grupoj de ses aŭ dek, kiuj ludas sur la ondoj de la pruo. Mi ŝatas la marbirdojn kiuj flugas super la masto kaj la fokojn kiuj flosas sur siaj dorsoj ne tre fore.

Estas multe da golfetoj kie oni povas ankriĝi por resti nokte. Dum la nokto mi ŝatas kiam la vento blovas kaj eĉ kiam la pluvo falas, sed ofte estas tute trankvile. Dum la tago oni povas alteriĝi por promenadi tra la arbaroj aŭ grimpi laŭ la montetaj deklivoj. Mia edzino kaj mi legas sur la boato kaj promenas.

Se velboatado povas esti hobio, do tio estas mia.

Jonatano



PRI MIAJ PLANTOJ

En la jaro 2021, mia vivo estis tre malfeliĉa. Do, mia patro donis al mi (aldoni signifas ion alian) malgrandan, maljunan planton, kiun oni nomas "araneo-planto". Dufoje ĝi bezonis novan ujon, ĉar ĝi kreskis. La ujo de la araneo-planto nuntempe estas malgranda rubujo, kiun mi aĉetis ĉe Walmarto, kun glumarkoj sur ĝi. Bona rubujo, ne rubujaĉo. (Ĝi estas la plej granda planto en mia ĉambro.)

Nun mi havas multajn plantojn, kiuj sidas sur ĉarma tableto apud la fenestro en mia ĉambro. Se vi interesiĝas, mi havas foton.

Ĉe la maldekstra flanko: mia granda araneo-planto "Calathea Ornata", kiun mi klopodas revivigi, du araneo-plantetoj, du verdegaj plantoj, kiuj ŝatas la sunon, kaj planteto, kiu havas oranĝajn florojn en la formo de fiŝoj.

Fine, mi havas purpuran planton kiu pendas, kaj malaltan planton kun ruĝaj folioj.

Eble mi havos pli da plantoj, sed mia tablo estas jam plena!

Kristin Haber

PRI ARTKANTOJ EN ESPERANTO

Mi nomiĝas Liarono (LeeArron) Klosterman kaj mi estas doktora studento pri muziko, specife pri kunlabora piano/ akompanando (Collaborative Piano/ Accompanying). Ĉi tiu jaro estas mia unua NASKo kaj mi volis partopreni en NASK por pliboniĝi mian Esperanton kaj esplori la eblecojn de mia projekto (mia disertaĵo). Unu el miaj specialiĝoj kiel pianisto temas pri artkantoj, kiuj estas subĝenro en klasika muziko. Ne ekzistas multaj artkantoj en Esperanto kaj mi volas ŝanĝi tion!

LeeArron Klosterman

LA KUGLEGO EL VABAŜ'

Kaze ke vi bezonas ion por kanti dum via veturado hejmen, mi sufiĉe lastatempe tradukis tiun ĉi folkloran kanton de usonaj hoboj.

De profunda Atlantiko / al la Pacifika bord'
de la altaj montopintoj / al la sudo en akord'
Pro alto kaj pro belo / ne ekzistas por ĝi kaŝ'
Ĝi estas vagonaro / La Kuglego el Vabaŝ'

Refreno:
Aŭskultu la tintadon / kaj la ĝemojn de l' motor'
dum ĝi sagas tra arbaro / al stacio longe for.
Vidu la fumantajn tubojn / Flaru fulgon, sonu draŝ'
La viv' de homa ŝarĝo en / Kuglego el Vabaŝ'!

Oriente estas bele / Tion diras la homar'
De Novjorko al Detrojto / tiras nin ĉiela ĉar'
Plu ni iras al Ĉikago / Homoj svarmas en la Maŝ'
Sed pajlo pli altiras / en Kuglego el Vabaŝ'

Refreno

Ni gloru la prahobojn / Kiujn trafis la fatal'
de konduktoroj krudaj / kaj la policana ŝtal'
Ili nin instruis bone / per vagabondmidraŝ'
ne plu ni devas timi / pro Kuglego el Vabaŝ'!

Refreno

Hanso Becklin


esperanto